



BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

JUNIO
1953
RUZAFÁ. 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

NO SIEMPRE HEMOS DE SER NOSOTROS LOS QUE DIGAMOS ESTAS COSAS...

André Maurois, ilustre miembro de la Academia Francesa, en un artículo, recientemente publicado, dice lo siguiente:

«La confusión de lenguas contribuye poderosamente, en el mundo moderno, a la división de las mentes. Hace de todo extranjero una especie de monstruo con rostro humano que se nos presenta, poco más o menos, tan hermético como una zorra o un toro. Fuera de algunas excepciones, los hombres de Estado (o de negocios) que se expresan en una lengua extranjera, lo hacen con aprensión y dificultad. Los matices se les escapan».

EL GRAN CAMELO

En todo género literario, y más que en ninguno, en la novela, ha sido moneda corriente presentar a los protagonistas, fuera cual fuere su ficticia procedencia, departiendo entre ellos con fácil desenvoltura, como si fuesen compatriotas y no existiese para ellos la diversidad de idiomas. Llegó el cine, y, claro está, con la facilidad que concede la pantalla para presentar escenarios exóticos y con la posibilidad para pasar, a cada escena, de un país a otro, resulta que los personajes se entienden a las mil maravillas con todo el mundo, sea cual fuere su nacionalidad.

De entre todos los convencionalismos de la ficción, éste es el más frecuente, y, digámoslo claramente, el más indigesto. Pocos espectadores perdonarían una incongruencia cronológica de bulto; como, por ejemplo, que Colón emplease el radar o que, en un episodio de nuestra guerra de la Independencia, saliese a relucir una ametralladora. Ello haría levantar, indignados, a los espectadores. ¡Y habría que oír a los críticos! Sin embargo, a cada momento está ocurriendo esa paradoja de la inteligencia idiomática, y son pocos los que paran mientes en tal desatino. Así, en todas las películas en que hay escenarios exóticos, o mezcla racial, fíjense bien: ¡Todos se entienden perfectamente! ¡Todos son políglotas eminentes! No ocurren, no, situaciones difíciles, por culpa del idioma, como si el Espíritu Santo les hubiese dado el don de lenguas que concedió a los Apóstoles...

A lo sumo, cuando se trata de salvajes primitivos, de los que usan taparrabos, en las primeras escenas se valen de la mímica y de alguna palabra suelta que —¡Oh, milagro!— sirve para todo. Pero, al cabo de pocas escenas, ya todos se entienden perfectamente, y el supuesto galán norteamericano puede embarcar a la ingénuo belleza oceánica con sus dulces frases... en inglés de San Francisco.

Invitamos a nuestros amables lectores a que vayan al cine, con esa inofensiva mala voluntad. Rara será la película exótica en que no puedan pillar el gazapo. Y con la misma sencillez con que se entienden los protagonistas, se quedan tan frescos los productores, directores, supervisores, etc., etc., cuya misión nunca supimos delimitar. ¡Y pensar que, desde hace más de medio siglo, la solución existe, perfecta, fácil e idónea, a la disposición de todos, gracias al Esperanto!

Claro está que el Esperanto sólo sirve para hablar entre esperantistas. Pero está todavía más claro, que si todos no saben hablar el idioma auxiliar, es porque no se quiere tomar la pequeña molestia de aprenderlo. El marino que se ahoga por no haber aprendido a nadar, es bien tonto; y tanto los que van a países extraños, como los que viven en ellos, deben tener un idioma para comprenderse, sin necesidad de intérpretes ni remedios medioevales. Para eso hace falta tan sólo tener... buena voluntad. Ni cuesta dinero, ni esfuerzos ingentes, ni se menoscaba el propio idioma; al contrario, se le aprecia más porque se le conoce mejor.

Tan sólo faltan: comprensión y decisión. Las personas comprenden... pero son los gobiernos quienes finalmente deciden. ¿No tarda ya demasiado la decisión?

La tempo fluge rapidas, alproksimigante la daton de nia Kongreso

Wk 108/1/22

● **BONHUMORAJ PILOLOJ** ●

Mi konas samideanon tiel frandeman, ke li nomas la tagojn de la semajno tiele: *Lumbo, Lardo, Bankedo, Saŭco, Vinbero, Salato kaj Dimanĝo.*

Finfine, la polemiko inter S-ro Smith, la famkonata angla arkeologo, kaj S-ro Smith, la glora usona historiisto, finiĝis. Triumfis la angla scienculo, kiu, kontraŭ la teorio de sia usona kontraŭanto, pri kruelaj persekutadoj al esperantistoj en la antikva Romo, pruvis per siaj lastaj eltrovaĵoj, ke en la Roma Imperio ne estis eĉ unu esperantisto.

La belgaj virinoj estas feliĉegaj —al mi diris iam amiko Jozef!—, ĉar ili bezonas por esti belegaj nur simplan aldonon de litero «e».

Jen kelkaj difinoj pri esperantaj vortoj: **JANUARO.** Moknomo ofte donata al verkistoj trouzantaj la vortojn ja kaj nu.

FEBRUARO. Antikva kolekto de bruoj, por speciala uzado de feoj kaj feinoj.

APRILIO. Instrumento uzata de la antikvaj grekoj por ĉasi aprojn en Kanado.

JUNIO. Mitologia lando, kies enloĝantoj estis eterne junaj.

FERDEKO. Aro da dek feraĵoj.

MUTA. Unu el la du solaj kvalitoj, kiuj karakterizas la virinojn (Vi ĉiuj bone scias, rilate al la parolkapablo, virino estas aŭ MUTA aŭ MULTA).

JES. Jes (Jes, gesinjoroj).

STULTULO. Kun via permeso, la subskribinto

Alcibiades GONZALEZ MEANA
Ciaño-Santa Ana

RECEPTO POR FRANDEMULOJ

KRINGOJ EN PAPERIO

Por du tasoj da fandita porka graso, estas necesaj du aliaj da sukero, unu da blanka vino kaj iomete da absinto.

Oni kirlas kaj miksas la grason kun la sukero kaj la vino; oni aldonas la absinton kaj farunon laŭ la kvanto, kiun la pasto akceptos. Oni knedas forte la mason, kaj oni sternas ĝin poste per rulilo kaj oni adekvate tranĉas ĝin en pecojn per muldilo. Oni pikas la pecojn per forko kaj oni metas ilin sur paperon por kuiri ilin en forno.

Manuela Gallardo Gómez (Madrid)

..... **REVOJ**

Niaj revoj estas ĉiam kvazaŭ papilioj belaj. Malproksime briletantaj, puraj kaj mirinde helaj, sed kaptitaj en la mano, ili estas nur vermetoj, nur ludiloj de infano.

Estas ĉiam nur vermetoj niaj revoj la surteraj. Ili mordas nin kruele en la horoj tre mizeraj. Jen do ĉiam nia sorto: esti manĝo por la vermoj dum la viv' kaj post la morto.

JOSE MARTINEZ - Zaragoza

SFINKSA ANGULETO LA TURHORLOĜO

Turhorloĝo batas la kvaran horon. De la unua ĝis la kvara bato pasas 7 sekundoj. Kiom da tempo estas inter la unua kaj la dua batoj, kiam la horloĝo batas tagmezon?

Oni akceptos solvojn, por la premio, ĝis 11 Julio.

SOLVO DE LA PROBLEMO **STRANGA ŜTUPARO** EN LA PASINTA NUMERO

KO - KORO - KOROLO - ROLO - LO

Sama pruvo de grandanimeco estas suferi dum domaĝo, kiel ĝoji dum feliĉo. CERVANTES

KVANKAM PRESKAŬ NEKREDEBLE...

La baleno estas la besto, kiu vivas plej longe, ĉar ĝi atingas agon de tricent ĝis kvarecent jaroj.

Se la homoj povus movi siajn krurojn, samrapide kiel la formikoj, ili atingus monon de milkvinent kilometroj en unu horo

Tamen, dum la daŭro de sia vivo, homo vivinta 84 jarojn, eĉ se ne multe moviĝema, estas paŝinta sufiĉan distancon por iri dek fojojn ĉirkaŭ la terglobo.

La subtera galerio, plej longa en la mondo, troviĝas inter Koreo kaj Japanio; ĝi etendiĝas sub la maro je tre atentinda kaj efektiva distanco de 150 kilometroj.

Oni diras, ke la ciferoj regas la mondon. Almenaŭ pri tio mi asertas, ke la ciferoj montras ĉu iu lando estas bone aŭ malbone regata. GOETHE

◆ **LINGVA KONKURSO: LERNU TRADUKANTE!** ◆

Jen bela prilaborinda fragmento, kiun ni submetas al la zorgo de ĉiuj amikoj de ĉi tiu rubriko:

Tasko n.º 6. **TEKSTO:** «En la llanura desierta y pelada, sin rocas y sin árboles, no puede haber sombras, y la imaginación no puede crear fantasmas. En la llanura, la niebla, cuando descende, no es más que una obscuridad, y como no tropieza, ni por tanto se desgarra al prenderse en ningún objeto, no puede adoptar esos contornos pavorosos que simulan seres fantásticos y amenazadores. En la llanura, el viento no tiene nunca más que su propia voz de viento; pero no canta al pasar entre ramas y entre hojas, no silba resbalando por las piedras, ni aulla al encontrarse aprisionado en el laberinto de las rocas del monte...» *Párrafo de un cuento del escritor Manuel Linares Rivas.*

Klopodu traduki ĝin, kiel eble plej bonstile, kaj sendu ĝin ne pli malfrue ol la 1ª de Aŭgusto, al la adreso de **S-ro RICARDO QUILES, San Vicente, núm. 164 - VALENCIA**

Inter 26 ricevitaĵ tradukaĵoj, kiuj partoprenis en la 4.ª Tasko, ni trovis 19 trafajn kunlaborojn, apartenantajn al la sekvantaj gesamideanoj:

A. G. M. - A. G. M. - V. P. M. - A. E. R. - J. M. F. A. - R. C. M. - M. A. P. S. - J. G. I. - R. M. V. O. - J. I. V. - S. R. R. - S. A. - J. R. F. - J. 3. - R. A. B. - P. C. - V. J. - G. C. kaj L. Q. P.

Sed, aparte korektaj kaj bonstilaj estas tiuj de samideanoj Alcibiades González Meana, kaj Adonis González Meana, el Ciaño-Santa Ana (Asturio), kies tradukoj, kvankam ne estas egalaj, ambaŭ estas same ĝustaj kaj modelaj, pro kies motivo ni ŝanceliĝis kiun el ili elekti. Fine, ni decidis doni ĉi-foje la premion komune, tio estas, al tiuj du konkursantoj, tial ke ili estas fratoj, kaj amo kaj saĝo loĝas apude. Ili do ricevos, kiel premion, la libron ESPERANTO SESDEKJARA, kune kun nia sincera gratulo. Ni atentigas ĉiujn niajn laŭreatojn, ke se ili jam posedas ĉi tiun libron, kiun ni kutime sendas, ke ili resendu ĝin al ni kaj elektu alian, sur nia katalogo, el proksimuma prezo. Ni nin turnas nun al tiuj kamaradoj, kiuj ankoraŭ hezitas sendi sian tradukon, kun la instigo ke ili imitu la ekzemplon de tiuj du fervoraj samideanoj asturijaj, kiuj ankaŭ timis konkure traduki, kaj tamen ili gajnis tuj la premion. La lingva konkurseto ne estas tiom malfacila, kiom multaj legantoj imagas. Penu traduki vi ankaŭ kaj vi konstatos, ke ĝi ne estas peniga, sed agrabla laboro! Se vi ne tuj gajnos la premion, ne seniluziĝu pro tio kaj estu obstina. Via penado ne estos vana! Ĝi estos bona ekzerco por via perfektigado en nia lingvo, kaj ni bezonas perfektajn esperantistojn. Ne forgesu, ke el peno venas beno; kaj, cetero, ĉu la premio ne valoras la penon? Kaj nun, bonvolu kontroli vian tradukon, korektante ĝin laŭ la sekvanta teksto:

«Estas du belecoj en bona libro: la beleco de la frazoj kaj tiu de la enhavo. La frazoj de la bone verkitaj libroj estas sinsekva laboro de ĉarmo kaj de konstruo. Verki ne estas simple ordigi vorton post vorto. Estas fari ion alian, estas konstrui. Verkas tiel, kun tia retorika beleco, pli ofte la filozofoj ol la literaturistoj; ĉar la filozofoj adaptiĝas pli al la klareco kaj akomodas pli la frazon al la koncepto». *El artikolo de Noel Clarasó.*

GRAVA ALVOKO.—La seriozeo de nia movado postulas, ke ĉiu hispana esperantisto donu la mezuron de sia kapablo kaj de sia ofero al la ĝenerala profito.

Tiacele, kaj ankaŭ por kalkuli la nombron da kapablaj samideanoj por oficiala instruado de Esperanto, la Federacio alvokas ĉiujn, kiuj posedas atestilon, por kapablo aŭ instruokapablo, liveritan de iu ajn esperanta institucio, por ke ili sciigu ĝin al ni. Ni bezonas ankaŭ scii la akademiajn titolojn pri aliaj fakoj, krom ĉiujn aliajn konvenajn informojn pri la koncernuloj. Skribu tuj! Samtempe, la Federacio anoncas al ĉiuj aliĝintoj kaj aliĝontoj al la Kongreso en Bilbao, ke, akorde kun la Organiza Komitato, okazos ekzamenaj provoj por ĉiuj, kiuj dezirus havi atestilon por kapablo kaj por instruado de Esperanto. En nia venonta numero ni precizigos detalojn pri tiu provo, nepe atentinda kaj subteninda, kiu taksos ĝuste la lingvan nivelon de la hispana esperantistaro.

GRATULOJN AL MADRIDO PRO OFICIALA STARIGO DE LA ESPERANTO-GRUPO

Plezure ni sciigas, ke ĵus fondiĝis, oficiale kaj laŭleĝe, la Esperantista Grupo de Madrido, jam de longe alspirata revo de niaj tieaj amikoj, kiuj tiom verve kaj fervore strebas por la disvastigo de nia idealo en la hispana ĉefurbo. Ankaŭ en pluraj urboj oni atendas similan sukceson, post Bilbao kaj aliaj urboj, kio devas esti stimulo por ĉiuj ceteraj grupoj, kiuj klopodos organizi siajn fortojn por plia efiko en la komuna laboro. Antaŭen, do!

INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

Ne vane oni diras, ke la mondo ne havas atendejon... ĉar, en ĝia senhalta turnado, eĉ la meteorologio ofte imitas nun la homajn ekstravagancojn. Emfazi pri frosto dum vintro, aŭ pri varmo dum somero, estas ordinara rekantaĵo; sed ne jam tiel ordinare estas rakonti pri la subita neatendita malvarmigo, kiu strange ĵus ekregis en mia regiono, ĉe la sojlo de l' somero. Pro tio, la preparitajn frazojn pri flugado kaj trilado de perdriloj kaj alaŭdoj mi devas gardi por alia okazo, kiam venos --anstataŭ kvazaŭa vintro-- la normala vetero, kiu decas por varma sezono.

Kaj, atendante tion, mi ŝparas hodiaŭ spacon kaj tempon por rekte komenci revui la vicajn da novaj-malnovaj titoloj:

Je honoro kaj memoro al la diversaj hispanaj ĵurnaloj, kiuj favore raportas por nia lingvo, dise tra la tuta lando, venas en la fronto de la nuna parado kelkaj nomoj de *hejmaj gazetoj*. LINGUA CLUB, bulteno de la poliglota societo de Manresa, impresas plaĉe pro belaj kontribuoj en pluraj lingvoj, inter kiuj Esperanto okupas elstaran lokon, precipe en folkloraj artikoloj. Lastatempe, en solena ceremonio, okazis la beno de arta standardo por la vigla Esperanto-fako de tiu progresema societo. LA TOSCA, urba gazeto de Moyá, la ĉarma urbeto, kie agema rondo

de samideanoj inde kaj digne popularigas nian movadon, pere de la paĝoj de tiu simpatia informilo. RADIOVISION, teknika revuo, monate aperinta en Madrido, ankaŭ rilatas *praktike* favore, ne nur per laŭdaj vortoj, sed per rekta apliko de nia lingvo en klariga resumo por ĉiu artikolo; mi salutas la bonajn amikojn, kiuj zorgas pri tia redaktado; ili certe daŭros longe en sia laŭdinda tasko kaj sukcesos venki la diabletojn, kiuj, en formo de presaj kaj gramatikaj eraretoj, ankoraŭ ofte nun enŝoviĝas, bedaŭrinde, en la kampilojn de tiu vere grava revuo; kiun nepre devas posedi ĉiu esperantista radio-amatoro. ALHAMBRA, organo de internacia filatelista klubo en Granada, la suda urbo garnita per la mirinda araba palaco, kiu donas nomon al la revuo, estas alia inteligenta praktikanto de nia lingvo, por siaj specifaj celoj. Dank' al tio, ĉiu hispana filatelisto eĉ povas lerni Esperanton, sek-vante la kurson lerte aranĝitan en ĝiaj paĝoj; krom tio, hispanlingvaj tekstoj pledeas por nia afero por trafaj argumentoj. Kaj, jam eksterlande, mi daŭras en la sama fako: LA FILATELISTO estas simpatia kajero, modeste sin nomanta ligilo inter la esperantistaj filatelistoj. Sed, ĝi estas io aparte agraba kaj hejmeca pro la maniero prezenti siajn proprajn preferojn. Jen eta



XIV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO 7 - 8 - 9 - 10 de Agosto de 1953 en BILBAO

Con cerca de trescientos adheridos y casi tan sólo con un mes por delante, se perfila ya con trazo seguro el éxito de nuestro Congreso, que será uno de los más importantes celebrados hasta ahora en España. Ha entrado a formar parte del Comité Organizador D. Pedro de Icaza, Vizconde de Moreaga, antiguo y querido colaborador de nuestro Congreso, en 1924. Se procura un fervoroso esperantista, que fué Presidente del último Congreso celebrado en Bilbao, en 1924. Se procura cuidar todos los detalles para que la organización sea perfecta y a satisfacción de todos, esperándose que esta labor será facilitada con la adhesión inmediata de los que aún no se han decidido, que no deben esperar hasta última hora, pues en tal caso no figuraría su nombre en el magnífico KONGRESO-LIBRO, cuya edición está ya en marcha. La autorización gubernativa ya se ha concedido para todo el conjunto de actos que constituyen el magno certamen de nuestra próxima asamblea nacional.

Acaba de ponerse a la venta el decorativo cartel que se ha editado a SEIS colores, muy propio por su formato (50 x 34) para ser expuesto en escaparates y en el interior de locales. Puede adquirirse al precio de UNA PESETA el ejemplar, pagándose con ello tan sólo el valor neto del papel y la estampación. Quedan ya pocas existencias de la bonita postal, que debe ser rápidamente adquirida por todos, para ser ampliamente difundida en la correspondencia al extranjero, como pregón jubiloso de nuestra fiesta.

La capacidad y el entusiasmo de los organizadores garantiza a todo congresista un máximo de comodidades y alicientes con un mínimo de gastos, haciendo asequible a toda la familia esperantista española la grata oportunidad de reunirse personalmente para conocerse y apreciarse mejor. Habrá, además, una nutrida concurrencia de samideanos extranjeros, que darán a nuestra reunión un auténtico carácter de Congreso internacional. ¡Adelante, pues, sin dudas ni vacilaciones! ¡Todos a Bilbao!

Comité Organizador del XIV Congreso Español de Esperanto. Ronda, 32 - BILBAO

VOJAĜO AL LOURDES estas en preparo, okaze de la 24^a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj. Petu informojn al S-ro Dalmau Argemi — Lauria, n.º 98 — Barcelona

Saluton kaj dankon al karaj samideanoj en Hispanujo

Sub ĉi tiu sama titolo, en la maja numero de «La Ponto», oficiala revuo de Germana Esperanto-Asocio, aperis la sekvanta ĝentila dankesprimi, kiun plzure ni represas:

Dum nia trisemajna vojaĝo tra Hispanujo ree bonege pruviĝis, ke nia kara patrujo, Esperantujo, troviĝas en la tuta mondo. En Valencia kaj en Barcelona ni havis okazon renkonti esperantistojn dum kelkaj, ho bedaŭrinde, nur tre mallongaj belegaj horoj. En ambaŭ urboj la samideanoj precize renkontis nin; kaj, oferante sian valoran tempon, ili tre afable gvidis nin kaj en bonega Esperanto klarigis al ni la vidindaĵojn. Ni komprenis unu la alian senhezite ekde la unua minuto; mi persone eĉ ne trovis la plej malgrandan fremdan akcenton, kaj ĝojigis min post la «hispana balbutado» finfine la senpera ĝuado de flua konversacio. Nun ni sentis nin vere «hejme en fremda lando» kaj povis demandi ĉion, kion nia cerbo kaj koro jam dum la tuta vojaĝo amasigis. Kaj niaj bonaj samideanoj senlace, kun pacienco kaj «hispana ĝentileco», informis nin pri la hispana vivo, la paskaj ludoj kaj moroj, pri la bataloj kontraŭ virbovoj, pri la socio, la lernejoj, la hispanaj lingvoj, la klimato k. t. p. Sed tio ne estis nur supraĵa babilado, kion oni ofte nur havas en fremdaj lingvoj, sed dank' al la bonega scio, precipe de la samideanoj Luis Hernández en Valencia kaj J. Borel kaj Ricardo de Luna en Barcelona, ni estis bonege informitaj pri detaloj, kiujn ni sen Esperanto neniam estus lernintaj. Ke tiuj du tagoj en Valencia kaj Barcelona estis por ni esperantistoj kulminaj punktoj de la vojaĝo, malgraŭ tiom da interesaj travivaĵoj, estas la merito de niaj karaj helpemaj samideanoj. Al ili ni diru ne nur *muchas gracias* (tion ni intertempe lernis!), sed ankaŭ koran dankon kaj salutojn el Germanujo! **D-rino H. L.**

ekzemplo: «Oni diras, ke la poŝtmark-kolektado estas pasio. Ĉu ne nur strangulo emas elspezi monon por malgranda glupapereto, kolektante jam eluzitajn poŝtajn afrankbiletojn? Sed, ĉu ne ankaŭ la muziko, ŝako, sporto iĝas pasioj, eĉ pli egaj, ĉe pluraj homoj? Se ili ne estas troigataj, ili estas pozitivaj kaj utilaj pasioj!» INTERNACIA POŝTMARKA REVUO, kiel organo de Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj, konfirmas la atestojn de la antaŭaj kolegoj sur la vasta kampo de la filatelio. LA JUNA VIVO petole grimacas per la verdaj literoj de sia titolo; ĝi estas vivoplena organo, kiu dis-radias Junecon eĉ per sia sola elmontr. Oni verve tamburas por la 9^a Kongreso de la Junular-Organizo, kiu okazos komence de Aŭgusto en Worgl, la ĉarma tirola urbeto, kie troviĝas la Zamenhof-monumento. La junula gazeto ankaŭ estas tre valora pro sia enhavo, kiun oni povas dividi je du partoj: la instrua kaj la socia, por korekte lernigi al la junularo ne nur la gramatikajn regulojn de nia lingvo, sed ankaŭ ĝian spiriton. En artikolo, kie oni priskribas viziton al nigrula universitato en usona urbo, oni diras: «Post la kunveno, longa vico da studentoj formiĝis sur la plat-formo: ĉiuj silente premis nian manon. Neniam antaŭe mi sentis tiom la simbol-econ de la manpremo. Ĉi tie, ĝi esprimis pli ol vortoj povas diri. Mi forte sentis, kion ĝi signifas: «Dankon al vi pro via

vizito, senatente al nia socia apudŝoviĝo. Diru al la homaro, ke ankaŭ ni sopiras esti parto de la homaro, ke ni arde deziras lerni, labori kaj vivi!» Komplemento de tiu socia eduko, sed laŭ alia direkto, estas la taskoj de SKOLTA MONDO, vigla organo de la skoltaj esperantistoj, kiuj tiel digne kaj trafte reprezentas nian movadon en la pura medio de la skoltismo. Agrable estis al mi legi artikolon de la hispana agentino Dolores Benavent, pri la provoj, kiujn devas fari, krom la kutima promeso, ĉiu aspiranta knabino. Inter la postulatataj provoj troviĝas: «Sciĝi faldi la vestaĵaron, purigi la ŝuojn kaj kudri iun ajn vestaĵon, kiu ne estu de pupo». Bona ekzemplo, ĉu ne? Kaj nun, renkonte al mi, venas la lokomotivoj de la frontpaĝo de BULTENO de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj; bela jubilea numero, okaze de la 5^a jaro, kun loga verda kovrilo kaj spritaj vinjetoj, kelkaj el ili tre artaj, dise tra la paĝoj. Ĉi tiu bonega numero atestas pri la alta kapablo kaj pozitiva fervoro de niaj fervojistaj kamaradoj, kiuj trafte montras la irendan vojon... Gratulojn al ili!

Kaj ankaŭ gratulojn al ni ĉiuj, fidelaj adeptoj de viva idealo, posedanta la forton de internaj impulsoj, kiuj certe ebligas miraklojn de obstino kaj volo, en la nunaj momentoj de triviala skeptikismo, kiam eĉ la meteorologio rompas la mezurojn de sia propra ordo, kio efikas ne oportune por la pensoj de **LA LEGEMA KOBOLDETO**

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

- AUSTRALIA.—«The Australian News and Information Service», Oficina del Gobierno australiano, ha subvencionado un film sobre el continente del Pacífico, con divulgación de su geografía, economía y costumbres. Esta película documental, en 18 m/m., está impresionada en tecnicolor por el sistema Kodachrome y lleva banda hablada en Esperanto, estando siendo proyectada actualmente en distintos países europeos y americanos.
- ARGENTINA.—«Asociación Esperantista Católica Argentina» tiene su sede en Buenos Aires, en la Tercera Orden Seráfica de los RR. PP. Franciscanos (calle de Alsina, núm. 340 - Buenos Aires). Su Presidente es el sacerdote chino, R. P. Juan Bautista Kao, Filiales de esta Asociación Argentina, existen ya, además del centro de Buenos Aires, en Quilmes, Rojas, Córdoba y Santa Fé, siendo todas ellas un modelo de organización.
- BRASIL.—La revista infantil del «Servicio Social de la Industria», con una tirada de cien mil ejemplares, ha iniciado la publicación de un curso de Esperanto, para la divulgación del idioma auxiliar, como un instructivo recreo, entre sus pequeños lectores.
- NORUEGA.—La obra maestra de Henrik Ibsen y de la literatura noruega «Peer Gynt», ha sido llevada al Esperanto en magnífica traducción en verso, dentro de una admirable fidelidad; la obra tiene, además, como complemento, un valioso comentario y tres fábulas populares, que sirvieron de inspiración a Ibsen para escribir su novela.
- HOLANDA.—Al Congreso Internacional de Ferrovios Esperantistas, celebrado en Utrech, asistieron 433 personas de doce países distintos. En este Congreso se dió un avance a los trabajos iniciados sobre el «Diccionario de Esperanto de Voces Técnicas sobre Ferrocarriles», obra de útil consulta para técnicos y personal, cuya ponencia de redacción la constituye un valioso conjunto de ingenieros ferroviarios de diversas naciones.
- ALEMANIA.—El Ministro del Interior del Gobierno de Hesse ha autorizado el uso del Esperanto como idioma para la policía en sus servicios, durante los cuales se llevará como distintivo un brazaletes con la característica estrella verde sobre fondo blanco.
- AUSTRIA.—La Dirección de Correos, donde nuestro movimiento goza de gran simpatía, ha editado una tarjeta postal con textos en alemán, inglés, francés y Esperanto.
- YUGOSLAVIA.—En Agosto próximo saldrá a la circulación el sello de correos alusivo al Esperanto, con motivo del Congreso Universal de 1953; este sello, de color verde esmeralda, tendrá un valor facial de 15 dinares, y es esperado con gran interés.
- ITALIA.—El semanario católico «La Voce del Popolo», de Brescia, publica una sección con noticias del mundo esperantista. Esta sección, con carácter regular, informa a sus numerosos lectores de la situación actual del Esperanto a través del mundo.

***** EL ESPERANTO EN LA PRENSA ESPAÑOLA *****

La revista filatélica mensual del «Club Internacional ALHAMBRA» (Apartado de Correos núm. 109 - GRANADA), desde el número de Marzo está publicando un curso de Esperanto y reproduciendo el «Informe» elevado al Excelentísimo Sr. Ministro de Educación Nacional por nuestra Federación. Estos hechos demuestran la simpatía de esta importante revista por el idioma auxiliar, ya que, como club filatélico, sabe de la necesidad de un medio de relación.

«La Voz de Albacete» (14-5-53) y «Ofensiva», de Cuenca (7-5-53), son otros dos diarios que han publicado extensos y favorables artículos sobre el Esperanto. «Diez Minutos», de Madrid, la popular revista semanal, publicó en su número correspondiente al 24 de Mayo, un muy ponderado artículo con el título: «Es probable que el Esperanto sea declarado idioma de la UNESCO».

La Federación, recogiendo el sentir de sus socios, expresa públicamente a la prensa nacional sus parabienes por mostrarse parte en la difusión cultural que propugna nuestra Asociación. Y esta simpatía que se aprecia en la prensa, nos anima en nuestra labor de difundir el idioma, que sin postergar ninguna lengua nacional, proporciona un eficaz medio de comprensión internacional, tan sentida en los tiempos actuales, entre las personas con afanes de cultura.

- INGLATERRA.—El Club Esperantista de Londres (Fred Tallant Hall, 153 Drummond Street, London, N. W. 1) ha celebrado con gran brillantez el cincuentenario de su fundación. Los diversos actos se vieron realizados con la asistencia de distinguidas personalidades del mundo esperantista, que rindieron homenaje a esta prestigiosa entidad, una de las más antiguas que existen y que, desde su fundación, no ha interrumpido sus actividades.

Ricevitaj Libroj

LA ALASKA STAFETO kaj KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ. Du rakontoj originale verkita de ĉeĥa samideano F. Omelka. Eldono de «The Esperanto Publishing Company Ltd.» Heronsgate, Rickmansworth, Herts. - (Anglujo). Bindita, 96 paĝoj 22 x 14 cm. Prezo: 6 ŝilingoj, plus 4 penceoj por afanko.

En la revuo «Esperanto» jam aperis felietone ĉi tiuj rakontoj, kiujn la konata angla eldonejo prezentas nun, en formo de lukse bindita libro, al la bongusto de pli ĝenerala publiko. La temo ja meritas diskonatecon! Ofte, la plej grandaj heroaĵoj okazas laŭ tiel modesta maniero, ke la protagonistoj restas preskaŭ anonimaj, ekster la pli malpli vasta kampo de sia agado.

S-ro F. Omelka, per klara kaj flua lingvo, en trafe precizaj vortoj de elegante desegnitaj frazoj, kiuj estas regalo por la okuloj de leganto, priskribas ĵurnalistrajte du aŭtentikajn epizodojn, kiuj, en epoko de furioze reganta egoismo, atestas emocio, ke la sindonemo estas virto ankoraŭ ne plene elĉerpiginta. En «La Alaska Stafeto» oni travivas la superhomajn penojn de kvin kuraj viroj, kiuj, decide helpataj de la fidelaj hundoj de siaj sledoj, tra la glaciaj ebenajoj kaj montoj de Alasko, estis la kvin ĉeneroj de tiu angore bezonata stafeto, kiu, dum kruda vintro 1925, portis savan medikamenton al la plej ekstreme norda urbetino Nome, kie eksplodis epidemio de difterio. Tial, la vivo de multaj infanoj dependis de la malfacilegaj klopodoj de tiuj kvin viroj kaj de ties hundoj—admirindaj bestoj apud admirindaj homoj!—kiuj, plene sukcesinte en sia sublima entrepreno, transformis ĝin en plej gloran epopeon.

En «Kaptitoj de la glacirokoj» oni prezentas alian aspekton de terura batalo kontraŭ naturaj malhelpaĵoj, fine venkita de homa sindonemo: Aviadilo akcidente frakasigas sur altegan glacirokon de la Alpoj; inter la pasaĝeroj troviĝas inĝeniero Payen, sola atestanto por pruvi la senkulpecon de sia amiko Daumal, kiu estas sub minaco de mortpuno en grava politika proceso. Malgraŭ senespera situacio, en mezo de sia propra tragedio, la mizeraj kaptitoj en la sentina montglaciejo sopiras al savo, ĉe nur por savi la vivon de senkulpulo, ĉar «ili flugis, ili frakasigis. Akcidento, malfeliĉo. Tragedio. Sed, tie... tie (en la juĝejo) temas pri terura eraro». Tamen, aliaj modeste sindonemaj homoj, grupo de «Sav-

sindikato de svisaj alpinistoj», sukcesas jam en lasta ekstremo trovi la perditojn kaj solvi kontentige la konflikton. Ne kredu, ne, pri naŭva rakonto. Drasta, impona ĝi estas en sia klara simpleco, kvankam agrable liveranta optimistan konkludon, laŭ jenaj saĝaj vortoj, troveblaj sur paĝo 77^a; kie oni diras: «ke homo restis homo malgraŭ ĉiuj teruraj scenoj en koncentroj, ke homo ne ĉesis ami la homon kaj ne perdis intereson pri la vivo de sia proksimulo, malgraŭ sciigoj pri hekatomboj de mortintoj en gaskameroj, sur batalkampoj, en bombarditaj urboj aŭ sur ekzekutejoj». Ĉar «en la mondo estas ne nur kolero kaj malamo, sed ankaŭ amo...»

La lingvo, kiel jam dirite, estas vigla, facila kaj flua; oni legas ĉion glate, de komenco ĝis fino. S-ro Mason Stuttard zorge korektis la manuskripton. En la uzata ĵurnalista stilo estas akceptinda la vorto *flugejo* anstataŭ *flughaveno* aŭ *flugstacio*, ankaŭ uzataj, ŝajne por kontrasto, unu solan fojon. Tamen, uzi la vorton *lokomotivo* anstataŭ *trajno* aŭ *vagonaro* ne estas tiel rekomendinde... Peza mi trovis la frazon: «transveturo *trans* riveron» kaj ankaŭ nenecesa la neologismo *respiri*, kiun nur pro kelkfoja apero mi komprenis en la senco *en-spiri* kaj ne *re-spiri*, kiel unuavide, ŝajne pli logike, ĝi aspektas.

La libron certe akirus kun plaĉo, en ĝia nuna bela eldono, ĉe tiuj, kiuj jam felietone frandis ĝian enhavon sur la paĝoj de la oficiala organo de U. E. A.

LUIS HERNANDEZ

ESPERANTO - Junulkurso eldonita de S. A. T. - Amikaro (67, Avenue Gambetta) - Paris 20 (Francio). 165 x 240 m/m. kun ilustraĵoj sur ĉiuj 80 paĝoj. Prezo: 1 usona dolaro.

Celante francajn ĝelernantojn, aperas ĉi tiu lernolibro por gvidi kurson laŭ rekta metodo; kelkaj gramatikaj klarigoj taŭgas por la kursgvidanto, kiel temoj por klarigi kaj demandi al la lernantoj. Per fako «Aventuroj de Johanino kaj Karlo», lecionon post leciono, la ĝejnuloj, por kiuj estas verkita la libro, alkitimigis pensi, demandi kaj respondi esperantlingve kaj eniras en Esperantujon. La libro, kvankam por francoj, ankaŭ valoras por ni, hispanoj, pro tio, ke ĉe ni la franca lingvo estas sufiĉe konata por povi kompreni ĝin.

ERNESTO HURTADO

Legado de esperanta libro estas supera plezuro por konscia esperantisto

**CLUB INTERNACIONAL
ALHAMBRA**

Apartado 109 - GRANADA (España)

Revista mensual gratuita - Miembros en todo el mundo - Filatelia, Numismática, Correspondencia, Marcophilía, Esperanto, Legislación, etc.

Cuota anual en España: 30 pesetas.

Extranjero: 1 dólar U. S. A. o 1000 francos lvert, sellos nuevos conmemorativos exclusivamente.

===== INFORMACION GRATUITA =====

**INTERNACIA KLUBO
ALHAMBRA**

Postkesto, 109 - GRANADA (Hispanio)

Monata senpaga revuo - Membro en la tuta mondo. Filatelio, Numismatiko, Korespondado, Markokolektado. Esperanto, Leĝoscienceco, k. t. p.

Jara kotizo en Hispanio: 30 pesetoj.

Eksterlando: 1 usona dolaro aŭ 1000 franĝoj lvert, novaj jubileaj poŝtmarkoj ekskluzive.

===== SENPAGA INFORMADO =====

AKADEMIO DE ESPERANTO

Adreso: Oostduinlaan, 32 - Hago (Nederlando)

PUBLIKA KUNVENO DE LA AKADEMIO DUM LA UNIVERSALA KONGRESO EN ZAGREB

En la kadro de la 38^a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, okazos publika kunveno de la Akademio, en kiu la partoprenantoj havos la okazon direkti prilingvajn demandojn al la Akademio kaj libere diskuti pri lingvaj aferoj.

Proponoj por la tagordo de tiu kunveno devas esti sendataj al la adreso de la Akademio, almenaŭ antaŭ la fino de Junio. Ili povas esti duspecaj:

1. Oni povas formuli demandon pri iu lingva problemo rilata al Esperanto, pri kiu la Prezidanto kaj la aliaj ĉeestantaj Akademianoj donos sian opinionon.

2. Oni povas mem enkonduki iun temon pri la lingvo Esperanto en la kunveno kaj defendi ĝin.

En ambaŭ okazoj povos sekvi liberaj diskutoj laŭ la disponebla tempo. Ĉar tiu tempo estos limigita, la Akademio fiksos antaŭe la tagordon kaj elektos por tio la plej gravajn demandojn kaj temojn, fiksante ilian sinsekvon en la pritrakto.

En la tagordo aperos ekskluzive demandoj kaj temoj de ĉeestantaj personoj.

La publika kunveno okazos en la mateno de la 29^a de Julio 1953.

Ir. J. R. G. ISBRUCKER, Prezidanto

TOURING CLUB ITALIANO

Faldfolio en Esperanto, kiu prezentas sinteze ĉion, kion ĉi tiu itala turista asocio disponigas al siaj membroj en la fako de turisma literaturo kaj kartografio. La folion oni povas ricevi de la eldoninto:

===== «Touring Club Italiano» =====

Corso Italia, 10 ☉ Milano (Italia)

FIERA DI PADOVA

Afiŝo en Esperanto, anoncanta la internacian Foiron, kiu okazas ĉiujare dum Junio en la nomita itala urbo. Oficejo: Fiera di Padova-Via N. Tomaseo, 59 - Padova (Italia)

★ **LA LERNEJO**

La *terura* litero *n* ĝenas konstante niajn lernantojn kaj la duboj alvenas senĉese. Jen resumo pri taŭga uzado:

1-e. Litero *n* montras rektan komplementon: Ŝtelisto ŝteliston ne ŝtelas; mi manĝas ĝin. 2-e. Celon de movo (post la prepozicioj allasantaj ĉi tiun signifon, escepte *al'* kaj *ĝis*): Meti jakon sur sin; la museto kuris sub la tablon; mi vojaĝis en Francujon. 3-e. Ĉiaspecajn cirkonstancajn komplementojn, ĉe kiuj ĝi anstataŭas prepozicion: Hieraŭ mi veturis Londonon (ni anstataŭis *al*); mi laboris la tutan tagon kaj mi dormis la tutan nokton (ni anstataŭis *dum*). Oni ne devas anstataŭi per akuzativo prepozicion, kiu havas sencon kontraŭan al la funda kaj esenca senco de akuzativo kaj kiu signifas *eliron, formovon, deiron, malproksimigon*, kiel: *de, ekster, el*. Diru: Eliri el Barcelono, neniam: Eliri Barcelonon. Nia fina konsilo estas: Se malgraŭ ĉio vi havas dubon en iu ajn frazo, pri la bona aplikado de la antaŭdirita litero, pensu, ke ĉiam estas preferinda ĝia ne uzado ol ne ĝusta uzado. Saluton!

ESPERANTAJ KURSOJ PER KORESPONDADO
Str. Forn, 19-Moyá (Barcelona) **R. Molera**, Direktoro

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a JUNIO 1953)

	Suma anterior	2.337 Ptas.
F. Alsina - Barcelona	50	»
Verda Kolombejo - Ciaño	30	»
J. Navalón - Cullera	6	»
J. Llopis - Cullera	6	»
F. Ferrer - Cullera	6	»
M. García - Cullera	6	»
J. Giner - Cullera	6	»
E. Fort - Cullera	6	»
J. Escrivá - Cullera	6	»
J. Bravo - Cullera	6	»
S. Arizmendi - Eibar	10	»
J. Bremón - Barcelona	10	»
G. Moya - Tarrasa	10	»
F. de Iruergas - Vigo	10	»
M. Peris - Catarroja	10	»
Total	2.515	»

Con la lista de hoy, la suma total queda por debajo de la del año pasado en la misma fecha. ¿Podremos así superar la marca?